






Association

'Une école au Togo'

09800 ARROUT

Tél 0561 968 208

Courriel :

uneecoleautogo@neuf.fr


Juillet 2006

*« Ech guto malgranda konstante frapante traboras la monton granitan. » Z*

*« Même une petite goutte qui frappe constamment, parvient à trouer la montagne de granit. »*



*Kiom ajn sufokata ghi estas, la vero chiam*

*finfine triumfas.*

*Aussi étouffée qu'elle soit, la vérité finit toujours par triompher.*



Aparta estas tiu bildo. Rigardu kaj diru kial!

Cette photo est spéciale, voyez-vous pourquoi ?

# Fino de la lerneja jaro 2005-06 en Instituto Zamenhof

La rezulto de Instituto Zamenhof (IZo) che la jarfina ekzameno 2006 de CEG (Kolegio) tiom mirigas homojn, ke ili volas koni la lernejon. Jen kantistoj kaj jhurnalistoj kontaktas IZon por reklami pri ghi. Ankau aliaj lernejoj proponas kunlaboron. En la lasta semajno de la lerneja jaro IZo povis enkadrigi tiujn proponojn en la celebrado de la jarfina festo. Okazis futbalmatcho, koncerto kaj pikniko.



E-kurso al lernantoj de la kvara klaso post la jarfina

Cours d'esperanto aux élèves de la 4°

La 4-an de julio okazis futbalmatcho. Lernejoj najbaraj deziris ludi kontrau IZo, sed tiu chi preferis ludigi siajn instruistojn kaj gelernantojn. Jen la teamo de la gelernantoj klopodis chifoje gajni. Kvankam kelkaj instruistoj tiam ne povis ludi, la gelernantoj malfacile enpafis unu golon. Chiuj tiam pensis, ke la junuloj aldonos pliajn, char la instruistoj estis tre lacaj, pli kauris ol kuris dum la ludo. Finfine, instruisto enpafis belan golon. Neniu plu tion faris ghis la fino de la matcho, kiam IZoanoj forlasis la stadionon tiam plenan je homoj, kiuj venis por vidi la centprocentulojn.

La 5-an de julio okazis koncerto ene de IZo. Kantisto togolanda faris la proponon al IZo, kiu tiel eksperimentis. Kvar kantistoj kaj programanimanto en la radiostacio de Lome agrabligis la etoson. Krist Bardol, Gnanki Gnankana, Prince Yvencio, Monika kaj Malik, unu post la alia prezentis siajn kantojn. La enkonduko, komentarioj kaj taksadoj de la grava kaj renoma programanimanto Tony Be Cool donis apartan aromon al la evento. De la 14-a ghis la 18-a horo tondradis en Instituto Zamenhof. La tuta kvartalo bolis. Char IZo-anoj estas ne noktuloj, chio chesis antau la apero de la mallumo. Chiuj devis reveni la postan tagon al IZo.

La 6-an de julio 2006, jam je la 8-a bruegis en la Instituto.





*Oni vidas, ke iuj lernantoj estas kontentaj dum aliaj ne…*

*On remarque que certains élèves sont contents, d'autres non…*



*Kalkuloj de notoj (poentoj) por la jarfina rezulto.*

*Calculs des notes (pointages) pour le résultat de fin d'année.*

# Fino de la lerneja jaro 2005-06 en Instituto Zamenhof

Diversaj muzikoj audighis. Gelernantoj kaj geinstruistoj estis tie. Ghis la 14-a horo okazis dancadoj, manghado kaj diversaj ludoj. Sekvis poste tamtamludo de lernantinoj de la elementa nivelo de IZo. Ne mankis ankau teatrajhetoj de la gelernantoj de CEG-nivelo. La gepatroj cheestis mirantaj pri la prezentoj de la etuloj. La gelernantoj de la lasta klaso de CEG, kiuj jhus sukcesis la jarfinan ekzamenon, prezentis specialan dancon. Dume staris ilia foto sur la tablo honora. Gelernantoj interpretis kantojn de famaj kantistoj por honori la sukcesintojn. Estis granda ghojo en la tuta lernejo. La gepatroj estis tre kontentaj ne nur pri la rezultoj de la lasta klaso de CEG, sed ankau pri tiuj de la aliaj, kaj ghenerale pri la organizado de la laboroj en IZo.

Je 16-a horo komencighis la proklamado de la rezultoj de la aliaj klasoj de la lernejo. Ghenerale la sukceso chirkauas naudek procentojn. La plej bonaj gelernantoj ricevis premiojn konsistantajn el lerniloj kaj stipendioj. Tiel multaj gelernantoj nek achetos lernilojn nek pagos iom da lernokotizo en la jaro 2006-07.

"Instituto Zamenhof, chiam supren" kriadis la gelernantoj kaj ech gepatroj. Estis malfacile haltigi la ceremonion, sed tamen, chio devis chesi.

Gepatroj impetis al la instruistoj de IZo por peti lokon al siaj gefiloj. Chu ne estas nun tro frue akcepti novajn gelernantojn ?

Che la fermo de la koncerto de la 5-a de julio 2006, Tony Be Cool konsilis :"Homoj invados la lernejon kun chiaj paperoj por serchi lokon. Bonvolu bone atenti, ke je neseriozaj geknaboj plenu la lernejo. Neniam akceptu gelernantojn trans la kapacito de viaj klaschambroj. Kiam la nombro ne estas tro granda, la laboroj estas pli zorge farataj. Plian sukceson ghis ducentprocente"









Gelernantoj estas sur la korto post la ekzamenoj.

Etudiants dans la cour après les examens

Kreskis la semo, manghataj estas la fruktoj...

La graine a poussé, les fruits sont mangés...



















# La fin de l'année scolaire à l'Institut Zamenhof

L'année scolaire 2005-06 vient de se terminer. Les derniers examens ont eu lieu. Voici les résultats !

## Niveau élémentaire

· *première classe*

22 élèves sur 30 ont réussi, soit : 73,33 %

· *deuxième classe*

27 élèves sur 37 ont réussi, soit : 72,97 %

· *troisième classe*

15 élèves sur 23 ont réussi, soit : 65,21 %

· *quatrième classe*

· 16 élèves sur 19 ont réussi, soit : 84,21 %

## Niveau secondaire (CEG)

· *première classe*

40 élèves sur 43 soit : 93,02 % de réussite

· *deuxième classe*

39 élèves sur 47 soit : 82,97 % de réussite

· *troisième classe*

20 élèves sur 31 soit : 64,51 % de réussite



Monika kaj Malik

· *quatrième classe*

il s'agit de la dernière classe du CEG. Les élèves passent les examens d'état qui permettront aux lauréats de poursuivre leurs études au lycée. Ce cycle de trois ans ouvre sur le baccalauréat et ensuite la poursuite des études en université ou dans de grandes écoles.

Cette année, pour la première fois, les étudiants d'Izo se sont présentés à l'examen.

Voici le commentaire qu'en a fait un journaliste d'une station radio de Lomé :

« Tous les candidats d'une école dont le nom a une consonance germanique ont réussi. Je ne nommerai pas le nom de l'école n'ayant pas reçu l'autorisation de son directeur. 100 % de succès à des examens d'état au Togo ! C'est vraiment incroyable. Je n'ai jamais entendu cela de toute ma vie ».



Tonu Be Cool



La kantiston (le chanteur)
Gnanki Gnankana,



Prince Yvencio